5ª JARO 1907-08 Nº 42 NOVEMBRO

Espero Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO
REVUO DE REVUOJ. — BIBLIOGRAFIO. — 'SAKOJ

« Unum ovile et unus pastor.» (Joh. X, 16,) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto.»

ABONEJOJ DE E. K.

FRANCLANDO : 'Ce la Direktoro de E. K. — 'Ce la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépéde, *Paris-V.* — 'Ce librejo Warnier kaj Ko, 15, rue Montmartre, *Paris.*
ANGLOLANDO : British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, *London, W. C.*
BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Worstraat, 50, *Courtrai.*
BOHEMUJO-AUSTRIO : F. Topič, libr. Ferdinandova, 9, *Praha.*
CHILLANDO ; S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, *Santiago-Chili.*
GERMANLANDO : Moller & Borel, 96, Prinzenstr., *Berlin.*
HISPANLANDO : S-o A. Jimenez-Loira, Paterna, *Valencia.*
HOLANDUJO : S-o H. B. van ZWET, Heerenweg, 51 bis, *Utrecht.*
HUNGARLANDO : S-o Endra Varju IV, Kigyo, U, 62. em. 14, *Budapesto.*
ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, *Fontanafredda de Pordenone* (Udine).
LITOVUJO : P-o A. Dombrowski, en *Kovno.*
NOVA ZELANDO : S-o A. J. Burges, libr. Devon Street, *New Plymouth* (New Zealand).
POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, *Warszawia.*
RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjaceskaja, 24, log. 19. *S. Peterburgo.*
SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corraterie, *Geneve.*

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Ce la Direktoro : **P-o Em. PELTIER**
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) **France**

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Por la FRANCAJ poŝtmandatoj la Poŝtoficejo estas SAINTE-RADEGONDE ; por la NEFRANCAJ la poŝtoficejo estas TOURS.

'Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

ARTIKOLARO

Lourdes. — P-o Van Oevelen . 33
Letero de Kuracisto. — D-o Louis D. 36
Mariavitoj. — F. Rawicki . 38
Katolikismo kaj Pacifismo. — J. D. 41
Morto de Beethoven, de A. Karr. — Esper. C. de Rey-Pailhade. 43
Katolik-Esperantistaj Societoj 47
Paĝo de l' Direktoro . 49
Universala Komunikilo . 50
Propaganda Kroniko. — L. Milho . . . 51
En la Mondo Esperantista : Promenado tra la gazetoj ; La Tria Kongreso ; Bibliografio. — Prof. E. Lime 53
Ŝakoj. — Al. Wagner 63

PRESEJO S. MARTINO

(Presejo de *Espero Katolika*)

Liveras ĉiuspecajn preslaborojn.— 100 vizitkartoj por **1** fr.**50**; 200 vizitk. por **2** fr. **50**. — Cirkuleroj in-8, presitaj sur *una* flanko 200 por **4** fr. **50**; 500 por **6** fr.; 1000 por **8** fr.; — duobla folio (sama teksto) 200 por **5** fr. **25**; 500 por **7** fr. **50**; 1000 por **10** fr.

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : 5 fr. (2 Sm.). — En Francl. 4 fr. (1 Sm. 60).
Unu numero : 0 fr. 50, afrankite, (20 Sd.)

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝtmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

ATENTU! Sur la koverto de l' unua numero post la fino de l' abono estos stampata : Via abono finiĝis kun la lasta n-o.

ANONCOJ. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn ; — duona paĝo : 25 fr.; — 4-ona paĝo : 15 fr., — 8-ona paĝo : 9 fr.; — 16-ona paĝo : 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj. — *Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, aŭ al la Direktoro de E. K.*

MUZIKAJOJ DE S-ino JOSÉE GUIVY

Ho, Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof 1 fr.
En Sonĝo, poezio de D-ro Zamenhof . 1 fr. 60
Birdoj, forflugu, poezio el *Flandra Literaturo* 1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine 1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski 1 fr. 25

5ª JARO 1907-08 Nº 42 NOVEMBRO

ESPERO KATOLIKA

HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a

la 27-an de junio 1907

LOURDES (Lurd')

Pastro, okulatestinto de subita kaj miriga saniĝo en Lourdes, je la pasinta 16-a de septembro, diris al mi, ke tiuokaze duobla penso lin okupis; la unua : « Kiel potenca estas Mario apud Dio ! kiel bona ŝi estas por ni ! »; la alia « Kiel estas ebla, ke post tiaj mirakloj ekzistas ankoraŭ ateistoj ? ».

Por tiuj kompatinduloj, kiuj sin proklamas ateistoj, ni aldonas nur jenon Ili legu la libron de Huysmans, fama Franca verkisto, traktantan pri Lourdes : *Les foules de Lourdes*, 1906 (La popolamasoj en Lurd'), kaj ili scios jam pli multe rilate al tio.

Huysmans skribas : « La ateistoj diras « Oni devas antaŭe pruvi 1) Ke tie okazas resaniĝoj ; 2) Ke oni ne devas ilin alskribi al sanig-forto de l' akvo ; 3) Nek al imago de l' malsanuloj ; 4) Nek al nekonataj fortoj de la naturo.

1) *'Ĉu okazas saniĝoj en Lourdes?* — ,Jes, kaj ne nur multaj, sed ankaŭ belaj. Kompatinda liberpensulo, vi volas esti *certa* pri tio. Nu do, iru iam tien por vidi; tio ne kostas multe da penoj. Parolu al la kuracistoj de l' malsanuloj. Eĉ vi povus tie gajni gravan monsumon. S-o Laserre, sanigita je blindeco kaj konvertita, metis en la Parizan Bankon la sumon da 50.000 fr. gajneblan de tiu, kiu pruvos ke estas io falsa en la centoj da saniĝoj, kiujn li rakontas. Pruvu ke Lasserre mensogas, kaj vi akiros la ne malŝatindan sumeton. Facila afero, ĉu ne?

Bernstein, la fama direktoro de la Nancy'a medicina

lernejo, deklaraciis, kvankam Judo, ke la mirigaj faktoj, kiujn li vidis en Lourdes, estas tute veraj.

Ni plidiras ke 2.712 kuracistoj el ĉiaj opinioj ekzamenis en la Konstata Oficejo de Lourdes la pruvojn de l' mirindaĵoj, kaj nenion kritikis en ili.

Estas do pruvita. ke tie fariĝas multaj saniĝoj.

2) *'Ĉu la saniĝoj ne devenas de l' natura forto de l' akvo?* — Ne, kuracistoj kaj kemiistoj el ĉiaj opinioj analizis la diritan akvon, kaj ne trovis en ĝi ian substancon ne ekzistantan en ĉiuj naturaj akvoj.

Plie, la varmaj akvoj, kiujn oni trovas en kelkaj landoj, sanigas nur post kelke da tempo, kaj nur iaspecajn malsanojn; la akvo de Lourdes sanigas kelkafoje subite kaj ankaŭ ĉiaspecajn malsanojn. Ankaŭ, en Lourdes okazas saniĝoj eĉ sen la uzo de l' akvo, kaj precipe per la benado kun la Tre Sankta Sakramento.

3) *'Ĉu tiuj saniĝoj ne okazas dank' al la imago de la malsanuloj? Alivorte, ĉu ne sufiĉas, ke oni kredas, pensas, ke en Lourdes oni certe saniĝos, por ke oni certe estu sanigata?* — Ke en Lourdes kelkafoje okazas saniĝoj dank' al la imago kaj nerva troeksciteco de unu aŭ alia virin-persono, tio estas ebla; kaj se la anoj de la Kuracista Konstata Oficejo tion suspektas, tiaj saniĝoj estas simple neakceptataj kiel mirakloj; sed ekzistas centoj da sanigoj, pri kiuj la imago nenion povas. Ekzemple Ludoviko Bourlette, kiu estis subite sanigita je lupuskankro; ja, kvankam li havus la plej potencan kaj vivan imagon, tio ne estus liberiginta lin de lia malsano.

Plie. kion diri pri la saniĝoj de junaj infanoj? Paŭlo Marcère, kiu en 1866 estis sanigita je duobla hernio. certe ne povis imagi, ke li estos sanigata. Tiu infano certe ne havis ankoraŭ « racian » aĝon.

Cetere en Lourdes saniĝas personoj, kiuj ne havas Fidon. Tiuj ĉi do ne imagas, ke ili estos sanigataj; ĉar male ili pensas, ke Lourdes ne povas sanigi ilin. Kiel pruvo, Gabriel Gargam, vagonara oficisto, kiu en 1890

estis morte vundita per renkontiĝo de du vagonaroj, estis deklaraciita de ĉiuj kuracistoj nesanigebla. Gargam tute perdis la kredon; sed por ne malĝojigi sian bonan patrinon, li lasis alkonduki sin de ŝi al Lourdes. Tien veninte, li turnis la dorson al la krucifikso; ĉe la groto oni preĝadis fervore ĉirkaŭ li, li sola restis indiferenta. Sed dum la procesio kun la Tre Sankta Sakramento, li eksvenas, malfermas la okulojn, ekstaras resanigata.

Tiu homo, tiu malpiulo, jam de dudek monatoj morte malsana, tute vundita, kun lamaj kruroj kaj enkankriĝintaj piedoj, estis subite tute resanigata.

Ni povas aldoni ankoraŭ jenon Kiam li sin prezentis ĉe la malsanulejo de Angoulême (Angulem'), kie li kuŝis antaŭe sur lito morte malsana, dum monatoj ĝis sia foriro al Lourdes, kiam li tie sin prezentis por konstatigi de l' kuracistoj sian saniĝon, oni eĉ ne permesis, ke li tien eniru. La Angulem'aj liberpensuloj ne havis la kuraĝon eĉ rigardi la mirindaĵon.

4) *'Cu la nekonataj fortoj de l' naturo ne sanigas en Lourdes ?* — Huysmans respondas jenon « En Lourdes okazas faktoj, kiuj estas tute kontraŭaj al la konataj fortoj de la naturo; okazas tie aliaj faktoj, pri kiuj estas pruvite, ke la fortoj de la naturo ne povas ilin efektivigi, kiel ekzemple la saniĝo de De Rudder (Vidu *Un Miracle contemporain* — Nuntempa miraklo — par le Dr Deschamps).

« Eĉ se en Lourdes estus demando pri nekonataj fortoj de la naturo, ni demandas kiu aplikas tiujn fortojn al la malsanuloj? Certe ne la homoj, ĉar ili ne konas tiujn fortojn; oni do devas akcepti supernaturan Estaĵon, kiu tie ĉi aplikas tiujn nekonatajn fortojn.

Ni finu tiun mallongan trakton per jena rimarko de l' sama verkisto :

« Kial la tiel dirata nekredanto ne volas akcepti la mirindajn faktojn de Lourdes? Tio estas tute simpla Tiuj mirindaĵoj povas nur veni de Dio do Dio kaj Religio estas vero; do senreligiulo aŭ ateisto devas plunumi la

devojn, kiujn ili ordonas; do li devas ŝanĝi kaj plibonigi sian vivadon; nu, estas ja tio, kio ne plaĉas al li kaj por kio li ne estas sufiĉe kuraĝa : estas plifacile pensadi liberece por vivadi liberece. »

O Nia bona Sinjorino de Lourdes, kompatu al ili! konvertu tiujn kompatindulojn ; ankaŭ ili estas viaj filoj, ankaŭ por ili kaj por la eterna savigo de iliaj multekostaj animoj via dia Filo disverŝis sian tutan sangon sur la hontinda — ne, glorplena krucarbo.

(Libere verkita laŭ G. v. A.)

C. VAN OEVELEN.

LETERO DE KURACISTO

Kiel sekvo al la supra artikolo, tute *teoria*, ni presas jenan leteron, kiu estas rimarkinda *fakto* :

La *Express de l'Ouest* publikigis speciale interesan leteron de nekredanta kuracisto, kiu ĉeestis ĉe la nacia pilgrimo de Lourdes.

Jen longa ekstrakto el ĝi.

'Ce la *Kuracista Konstata Oficejo* mi estis alligata kvazaŭ per krampoj.

Ho !kion mi vidis dum tiu semajno !

Mi volis vidi subskribojn de konataj kuracistoj : Fine de la kuracistaj atestoj, mi legis la plej famajn nomojn kaj la malplej suspektindajn pri klerikalismo.

Pli bone ol tio : mi flegis mem « aŭtentikajn » malsanulojn ĉe la Sepdolora Hospitalo. Kaj, bandaĝante kelkajn el la vundoj, mi diris al mi : « Jen certe io neresanigebla ! »

La morgaŭan tagon, estis kelkaj el tiuj vundoj, kiujn mi vidis resanigitaj !

Mi aŭskultis du ftizulojn, malsanaj je la plej alta grado. ambaŭ kondamnitajn al baldaŭa morto. Oni diris al mi. ke unu el ili oferis sian vivon por la resaniĝo de la alia.

La unua mortis la morgaŭan tagon precizege je la momento, kiam la alia eliĝis el la banejo kun novaj pulmoj.

Kiam mi almetis mian orelon al lia brusto, mi ne povis aŭdi la malpligrandan stertoradon.

Mi ekzamenis homon blindiĝita de kvin jaroj. Li estis prezentita sin ĉe la hospitalo Rothschild, kie oni ne volis lin akcepti, *ĉar lia malsano estis neresanigebla.*

Tiam li eniris ĉe la hospitalo *Quinze-Vingt.* La kuracistoj konstatis « pigmentan retiniton», pri kiu la medicina scienco konfesas sian malpovon.

Hodiaŭ, tiu ĉi homo vidas perfekte. Li reposedas ne nur kvaronon de sia vidado, sed la kvar kvaronojn.

Estas necese ke oni estu kuracisto, konante la senesperigajn malrapidaĵojn de l'naturo, por ne esti renversata per tiuj subitaj aliformiĝoj.

Pri tiuj, kiuj opinias ke la « nervoj » sufiĉas por fabriki tute novajn pulmojn, aŭ luti rompon, mi konsideras ilin kiel indaj por esti enfermigotaj en Charenton'.

Kiam mi diris al mi, ke la uzata kuracilo estas baneto dum kelkaj sekundoj en akvo, kies malvarmo povas rigidigi la plej bone fartantajn, ke tiu akvo devus mortigi la ftizulojn, ke ĝi ne devus havi efikecon por malblindigi okulojn, luti ostojn, cikatrumi vundojn, tiam mi sentis kvazaŭ *mi havas kapturniĝon.*

Kaj ankoraŭ, tre ofte, l'akva kuracilo eĉ ne estas uzata La plibonigaĵoj okazas subite kaj sen ŝajna kaŭzo : multaj personoj resaniĝas ĉe la Groto, aliaj reirante hejmen, ĉiam je momento neatendita kaj en cirkonstancoj, kiuj estas senfine malsamaj.

Oni sentas ke forto supernatura trapasas la amason. La kredantoj diras, ke tio estas la Virgulino,... ĝi estas vere bela kaj konsola.

Vi scias, ke mi ne povas kaŝi miajn impresojn. Mi estis entuziasmita. Feliĉe mi estas nek hebreo, nek framasono, kaj mi vivas honeste : tiamaniere mi havas nenian opinion antaŭelpensitan kontraŭ la katolikoj. *Mi estas por la vero.* Nu ! la veron mi tuj diros al vi.

Mi kredas la miraklon, ĉar mi ĝin vidis.

Pro tiu diro, mia kara amiko, ne konkludu, ke mi estas konvertita. Mi ne faris konfeson, kaj mi faris mian pilgrimon sen komuniiĝi. Sed mi sentas, ke la nekredemo, en kiu mi restadis pri la supernaturo, estas *malsaĝeco*.

Antaŭ faktoj tiel bone konstatitaj, nur pro kaŭzoj ne sciencaj sed personaj, oni povas nei la agadon de Dio.

Mi promesis, ke mi revenos la proksiman jaron. Kiu scias? Eble la Virgulino kliniĝos al mi, kaj resanigos mian animon.

Tio ne estos la malpligrava el ŝiaj mirakloj.

Ĝis revido, kara amiko; mi donas al vi koran manpremon.

Dr. Louis D.

MARIAVITOJ

Nova Sekto en Polujo

Pasis iom pli ol unu jaro, kiam en nia lando komencis rondiri la famo de ia nova herezo. Tiu ĉi famo komence ŝajnis nekredebla, ĉar nia nacio, ĉiam sincere katolika, neniam portis sur si similan makulon. Malfeliĉe tamen tiuj ĉi kaŝaj kaj mallumaj rakontoj malkovris, ke en katolika Polujo naskiĝis herezo.

Kaŭzoj, kiuj ekzistigis tiun ĉi malĝojan staton de aferoj estas tre diversaj. Mi ne intencas ĉi tie kalkuladi ilin, ĉar tia laboro okupus tro multe da loko; mi nur penos konatigi al la legantoj de E. K. historian devenon kaj kreskon de la sekto, kun ĝiaj doktrinoj kaj kun ĝia nuna stato. La afero prezentas sin tiele

En urbo Plock loĝas ia virino, nomata Kozlowska. Kiam, antaŭ dek kelkaj jaroj, ia malmulta grupo de junaj pastroj, dezirantaj konduki pli perfektan vivon, estis fondinta la kvazaŭ monaĥan societon, tiu ĉi ruza kaj verŝajne elokventa virino akiris al si grandan influon sur ilin.

Soçietanoj nomadis sin *Mariavitoj.* Iom post iom ili deflankiĝadis de rekta vojo. Ili komencis konsideri Kozlowska'n kiel profetinon el ĉielo senditan, kiel ian sanktulinon, simile nemakulitan kiel plej sankta Dipatrino. Tiuspecajn konvinkojn pri Kozlowska ĉi tiuj pastroj provis sisteme inokuli al siaj parokanoj.

Depost tio, hodiaŭ pasis jam tri jaroj, ili veturis Romen, prezentiĝis al la Kardinaloj kaj al la Sankta Patro mem, kiu ordonis, ke komisio *(Congregatio Officii)* pli precize esploru la vivmanieron kaj ŝajnajn viziojn de Kozlowska kaj rezultaton de tiuj ĉi esploroj al Li prezentu. 'Ci tiu komisio, esplorinte la aferon, decidis ke ŝajnaj vizioj kaj profetaĵoj de Kozlowska estas kutimaj halucinaĵoj aŭ fantazioj, kiuj iafoje trov-estas ĉe piaj virinoj histeriemaj; ke Kozlowska devas esti diretkata de prudenta kaj sperta konfesoro, kiu « penus resanigi ŝin pri la halucinaĵoj, kaj ŝin kondukus sur vojon de vera pieco ».

La kardinaloj decidis ke pastroj, nomataj Mariavitoj, devas eviti ĉiujn interrilatojn kun Koslowska; konsideri la regularon de ŝi donitan kiel nedevan kaj en obeemo al episkospoj restadi.

Tia decido tamen faris grandan maltrankvilecon. La ambicio de Kozlowska estis incitita en plej alta grado; ŝi intencis daŭrigadi sian antaŭan laboron kaj fariĝi reformistino de Eklezio. Pro la decido Roma, pastroj-Mariavitoj ankaŭ sin trovis en malfacila situacio. Jam sanktaj patroj de Eklezio diris; « Romo parolis, la afero estas finita ». (*Roma locuta est, causa finita est*). Sed tiuj ĉi vortoj estis por ili kiel nekompreneblaj, ĉar tie ĉi suferis ilia ambicio. Ili tiom da grandaĵoj intencis, tiel bonajn dezirojn havis! kaj subite tuta fundamento de ilia agado falis; tiu, kiun ili trovis inspirita kaj sankta estas nur kutima virino! Ili antaŭ ŝi genufleksis, ili malkaŝis al ŝi siajn korojn, permesis ke ŝi donadu al ili nomojn laŭ sia elekto; kaj tamen ŝi estas nur malsanulino, histeriulino. Kion diros pri ili la homoj !?!?

Kozlowska tamen ne malesperis. 'Si tuj sendis al siaj

« apostoloj », t. e. adeptoj, komisiojn; kaj komencis prepara laboro. Oni laboradis fervore kaj en preĝejoj, kaj en domo, kaj en kajutoj vilaĝanaj. Diservojn oni solenigis kun trogranda fervoro; oni enkondukis novajn kutimojn de pieco por distingiĝi de aliaj; por servoj religiaj oni akceptis nenian monon aŭ sumetojn ajn, kaj anstataŭe oni akceptis diversajn laŭvolajn monoferojn; oni vendis zonojn de Sankta Francisko, medalojn, ktp. Oni montris verajn kaj fantaziajn erarojn kaj falojn de pastroj nemariavitoj; eĉ oni diris malkaŝe, ke ĉiuj krom ili kuŝas en koto peka, ke ili solaj estas perfektaj kaj ke iliaj servoj havas valoron antaŭ Dio. Oni timigis, ke proksimiĝas la fino de l' mondo, alveno de Antikristo kaj diversaj punoj. kiuj minacas al tiuj, kiuj estas kontrauŭloj de Mariavitoj. Oni anoncis ke tiu kvazaŭ monakino Kozlowska havis vizion, ke kiu ne kredos en tio, tiu estos komdamnita je eterne. Unuvorte oni faris ĉion por akiri kiel eble plej multe da popolo.

Honesta kaj pia Pola popolo estis delogita; en lokoj de ilia apostolado, la tutajn tagojn oni restadis en preĝejo, oni lasis domojn kaj mastraĵon, oni preĝadis pri forigo de malfeliĉoj kaj mizeroj proklamitaj kaj antaŭdiritaj de pastroj Mariavitoj.

Tian jongladon ne povis toleri episkopoj. Ofte ili admonis la Mariavitojn, por ke ili akceptu decidon Roman kaj ne disvastigu la malsaĝaĵon inter popolo. Pro tio ke la admonoj ne sukcesis, ili decidis per punoj ekleziaj devigi pastrojn Mariavitojn, ke ili ne kontraŭstaru la ekleziajn rajtojn.

Tio estis kaŭzo de malkaŝa agado. Tiamaniere fariĝis skismo. Kelkaj parokoj en diversaj partoj de lando, instigitaj de tiuj ĉi pastroj, ne volis obei al siaj episkopoj kaj sin konfidis al la direktado de tiuj ĉi trompistoj.

Kiu estas la nombro de ĉiuj sektanoj, estas malfacile difini; tamen certe estas direble, ke ĝi konsistas nur el kelkaj miloj.

Eĉ tiu ĉi nombro konstante malgrandiĝas, precipe de

l' tempo, kiam Kozlowska kaj « papo » de sekto, Johano Kowalski, estis en decembro de 1907 ekskomunikitaj. Trompita popolo komencas dubi, ĉu farita paŝo ne kondukas al pereo kaj tiu ĉi dubo multajn jam returnigis al Eklezio.

Estas espero, ke tiu ĉi malsaĝa herezo nelonge vivados sur sana korpo de Pola nacio. Donu tion ĉi Dio plej rapide !

Verkis originale

F. Rawicki, Seminariano en Wloclawek, Polujo.

P. S. — Ni legas en *Corrispondenza Romana* :

« Oni anoncas el Varsovio, ke la sekto de l' Mariavitoj tre agitadas sin. La sektanoj havis kunvenon la 11-an de oktobro, ĉe kiu estis 32 pastroj. La celo de l' kunveno estis organizi definitive la sekton.

Ili elektis ĉefon, kiun ili nomas « ĝenerala ministro », kaj decidis, ke la liturgiaj ceremonioj estos solenigitaj en nacia lingvo.

La « Mariavitismo », por varbi adeptojn, celas esti ia Pola *Los von Rom*, kaj kolektos ĉiujn malbonajn « elementojn », kiuj sentas sin ĝenataj en Katolikismo « mallarĝa kaj maljunigita ». Tiamaniere la Mariavitismo estas ne nur religia aberacio, sed ankaŭ grava insulto al la gloraj tradicioj de l' Pola nacio. »

KATOLIKISMO KAJ PACIFISMO

Antaŭ kelkaj monatoj, grupo da katolikoj fondis *Societon Gratry, por la konservado de paco inter la nacioj*. kaj en la unua numero de la revuo de tiu ĉi Societo S-o Thénon, eminenta profesoro ĉe la leĝoscienca fakultato de Paris, konigis kia, laŭ li, devas esti la sintenado de la katolikoj en tiu nuntempa demando. Mi intencas resumi tiun gravan artikolon por la legantoj de *Espero Katolika*.

La aŭtoro unue memorigas la parolon de Jesuo : « Beataj la pacemuloj », kaj « Amu viajn malamikojn ». La deziro al paco, fariĝinta eĉ amo al malamikoj, estas do esence kristana sento. Estus facile pruvata, ke la Katolika Eklezio ĉiutempe estis predikanto de paco. Kial do klariĝas la nuna sentado kaj agado de multenombraj katolikoj pri pacifismo? Dum multe da nekatolikoj akceptas la kristanan doktrinon pri paco, tro multaj katolikoj kontraŭbataladas ĉian pacifismon, eĉ t'un de l' Evangelio, kaj adoras Dion de armeoj, ne Dion de paco. Ĉu ili estas pravaj ?

Neniu tamen povas nei, ke milito estas malbona precipe laŭ du vidpunktoj. Unue, se oni nur konsideras la materiajn malbonojn de militado, kiom da ruinaĵoj ĝi post si trenas, ofte neripareblaj, ĉiam prokrastantaj la progresadon de l' homaro. Milito tamen estas abomenindega, precipe tial ke ĝi estas morala malbono. Kompreneble ĝi estas maljusta almenaŭ unuflanke. Nu, maljusteco estas kondamnebla kiel inter privatuloj, tiel inter popoloj. Moralo ne estas landlima afero. Tial ĉu ne devus ĉiu kristano kore deziregi la efektiviĝon de la paco inter nacioj. Tio tamen ne signifas, ke li devas forĵeti la amon al sia patrujo, nur konservante amon al la homaro. Kristano, evitante samtempe la ekscesojn ĉu de ŝovinistoj, ĉu de internaciistoj, ĉefe amos sian patrolandon, sed ne eksklusive; ĉar lia amo estos limigita de la principo de justeco. Simile li estos nek por militarismo, nek kontraŭ. Ĉar se armeo ne estas, laŭ li, tiu sanktega afero, kiun oni ne povas tuŝi sen malpiegeco, li komprenas tamen ĝian nunan necesecon. Sed tial ke armeo estas nuntempe necesa, ĉu devas la katolikoj forĵeti pacifistajn ideojn, kiel ne efektivigeblajn aŭ ne ĝustatempajn? Neniel. Sed laŭ iliaj fortoj ili agados por igi la armeojn neutilaj.

Kiel oni forigis iam la privatajn venĝojn per leĝa informo kaj juĝo, tiel oni devas nun penadi plimultigi leĝajn internaciajn rilatojn. Sed se estas eble kaj dezirinde krei internacian leĝaron kaj fondi arbitracian juĝist-

aron, pli malfacile estos meti sankciojn, ĉar iaj nacioj eble rifuzos submetiĝon.

Dum mezepoko, ĉiuj Eŭropaj nacioj akceptis unu moralan aŭtoritaton, tiun de l' Papo. Hodiaŭ ne estas plu « unu ŝafaro kaj unu paŝtanto ». La katolikoj tamen, eĉ pro tio mem, devas kunlaboradi kun la pacifistoj kaj ili sukcesos se ili estos konvinkitaj, ke « nur la socialaj energioj, kiujn enhavas Kristanismo, povas naski inter la popoloj veran fratecon ».

Tiuj ideoj de S-o Chénon mirigos neniun el la katolikaj Esperantistoj. 'Cu en iliaj koroj ne sonas tiu ŝatata voĉo :

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

'Cu ne multaj estas, kiuj laŭ la vortoj de C. Aymonnier esperas, « ke Esperanto triumfigos fratecon universalan, ke dank' al Esperanto la milito malaperos, la paco reĝos ». Ne tiaj Esperantistoj malŝatos la celon de la *Societo Gratry, por la Paco.*

J. D.

LA MORTO DE BEETHOVEN

(Alphonse Karr)

Al la sindona kaj klera muzikistino Sinjorino J. Guivy tiun mallongan tradukon dediĉas

C. de Rey-Pailhade.

Dum sia vivo, Beethoven (1) havis nur momenton da feliĉo kaj tiu feliĉo lin mortigis.

'Ciam malriĉa kaj apartigita en la soleco pro la malestimo de siaj samlandanoj, kaj ankaŭ pro sia karaktero

1. Beethoven naskiĝis en Bonn en la jaro 1770, kaj mortis en Baden, malgranda vilaĝo proksime al Vieno, la 26-an de marto 1827.

nature sovaĝa kaj incitegita de la maljusteco, tamen Beethoven verkis la blej belegan muzikon, kiun homo iam skribis.

Per la belsona lingvo de la muziko li parolis al la homoj, — kiuj ne malŝatis lin aŭskulti, — tiel la naturo interparolas kun ili per tiu ĉiela harmonio de l' vento, de l' akvo, de l' kanto de la birdoj.

Beethoven estas la vera profeto de Dio, ĉar li sola parolis dian lingvaĵon.

Tamen lia talento estis nekonata, tial ke li devis mem kelkfoje — kaj por artisto ĝi estas la plej kruelega turmento — dubi pri sia genio.

Haydn ankaŭ, parolante pri li, uzis nur tiun laŭdon : « Li estas lerta klavecenisto. » Estus simile diri pri Géricault : « Li pistas bone la kolorigilojn ; » simile pri Gœthe : « Li ne faras ortografiajn erarojn » aŭ « li havas belan skribadon. »

Li havis amikon, Hummel, sed incitita de la malriĉeco kaj maljusteco, Beethoven iris Baden'on. Tie, kiel dezertulo li vivis malriĉe per malgranda rento apenaŭ sufiĉa por siaj bezonoj.

Lia plezuro estis erari en agrabla arbaro apud la urbo, kaj tie — forportita de sia genio — verki ravajn kaj belegajn simfoniojn, per harmoniaj akordoj lasi sian animon altiĝi ĝis la ĉielo kaj kun anĝeloj paroli tro belan lingvon por la homoj, kiuj ne ĝin komprenis.

Sed en la momento, kiam li tute ne pensis pri tio, letero kontraŭvole igis lin malsupreniri ĝis la tero, kie lin atendis kelke da novaj ĉagrenoj.

Nevo, pri kiu li zorgis kaj kiun li amis pro la helpoj, kiujn li havigis al li, skribis al la senmorta verkisto, ke en Vieno oni estis lin kompromitinta en bedaŭrinda afero kaj ke lia sola ĉeesto povos lin savi.

Beethoven foriris kaj, por ŝpari la monon, li faris piede parton de l' vojiro.

Iun posttagmezon, antaŭ malgranda kaj malnova dometo li haltis kaj petis la gastamon, ĉar ankoraŭ kelke da

mejloj li devis marŝi antaŭ ol alveni ĝis Vieno kaj, tiun vesperon, liaj fortoj al li ne permesis daŭrigi la vojaĝon.

Oni lin akceptis, kune kun la familio li vespermanĝis kaj poste sur la seĝegon de la familiestro li eksidis antaŭ la fajro.

Tuj kiam la manĝotablo estis formetita, malnovan klavecenon malfermis la mastro, kaj muzikilon alpendigitan al la muro prenis ĉiu el la filoj, dum la patrino kaj ŝia filino sin okupis per kelke da mastraĵ-laboro.

La patro donis la agordon, kaj la kvar muzikantoj komencis kun granda precizeco kaj per tiu speciala genio por la muziko, kiun posedas nur la Germanoj.

Verŝajne la muziko, kiun ili ludis, multe interesis ilin, ĉar korpe kaj anime ili sin dediĉis al ĝi ; por aŭskulti, la virinoj ĉesis momente la laboron kaj sur ŝiaj naivaj vizaĝoj oni ekvidis kvietan kortuŝecon kaj oni rimarkis la subpremadon de ŝiaj koroj.

Je tio, kio okazis, ne povis partopreni Beethoven, ĉar eĉ unu noton li ne aŭdis; tamen, per la precizeco de la ludantmovadoj, per la viveco de iliaj vizaĝoj, kiuj montris ilian kontentiĝon, li pripensis pri la supereco de tiuj ĉi homoj rilate al la Italaj muzikistoj, kiuj estas nur muzikaj maŝinoj perfekte organizitaj.

Kiam ili estis finintaj, kun varma kortuŝeco ili premis al si reciproke la manojn, kvazaŭ ili volus komuniki unu al alia la feliĉan impreson, kiun ili estis sentintaj, kaj plorante en la brakoj de sia patrino sin enĵetis la fraŭlino.

Fine post mallonga interparolado, ili reprenis la muzikilojn. Ili rekomencis; tiun fojon, ilia entuziasmo estis plenega kaj malsekaj kaj brilaj fariĝis liaj okuloj.

« Miaj amikoj, diris Beethoven, tre malfeliĉa mi estas, ĉar la plezuron, kiun vi eksentas mi ne povas partopreni. Mi ŝatas ankaŭ la muzikon; sed, tion vi jam rimarkis, mi estas tiel surda, ke ian sonon mi ne aŭdas.

» Bonvolu permesi ke mi legu tiun muzikon, kiu havigas al vi tiel agrablan, kiel kvietan kortuŝecon. »

La kajeron li prenis kaj liaj okuloj mallumiĝis, lia spirado haltis, poste li ekploris kaj teren lasis fali la muzikon. Tio, kion ludis la kamparanoj; tio, kio ilin entuziasmigis, estis la alegreto de la simfonio en A de Beethoven.

Cirkaŭ lin kunvenis la tuta familio, montrante al li per signoj sian miron kaj scivolon.

Dum kelkaj momentoj, ankoraŭ, konvulsiaj ploregoj malhelpis lin paroli, kaj poste li diris al ili

— Mi estas Beethoven. »

Tiam ili malmetis la ĉapelon kaj kun silenta respekto antaŭ li sin klinis; Beethoven tiris al si la manojn, kiujn premis kaj kisis la vilaĝanoj, opiniantaj ke la homo, kiu estis kun ili, estis pli granda ol reĝo.

Ili rigardis lin kaj de lia vizaĝo esploris la trajtojn por eltrovi la postsignojn de l' genio, gloran aŭreolon ĉirkaŭ lia frunto.

Al ili Beethoven etendis la brakojn kaj ĉiuj lin ĉirkaŭprenis, la patrino, la fraŭlino kaj ŝiaj fratoj.

Poste subite li sin levis, eksidis antaŭ la klavecenon, per signoj petis la junulojn, ke ili reprenu la muzikilojn. kaj li ludis mem tiun ĉefverkon. Ili estis tute atentaj, kaj muziko neniam estis pli bela nek pli bone ludata.

Kiam ili finis, Beethoven restis ankoraŭ ĉe la klavaro, kaj feliĉ-melodiajn kantojn de dankeco al la ĉielo li improvizis, kiel dum la tuta sia vivo li neniam estis verkinta.

Dum granda parto de l' nokto ili aŭskultis lin.

Tiuj ĉi kantoj estis liaj lastaj pensoj.

La familiestro devigis lin akcepti sian liton; sed nokte febro ekkaptis Beethoven; li sin levis kaj eliris nudpieda sur la kamparon por spiri aeron. Majestan harmonion elspiris ankaŭ la naturo; la vento unu kontraŭ la alian puŝegis la branĉojn, aŭ interniĝis en la aleojn, aŭ muĝante turniĝadis kaj ĉion rompis sur sia trairejo.

Li longe restadis ekstere, kaj kiam li eniris, li estis malvarmega. Oni iris Vienon por serĉi kuraciston;

brusta akvoŝvelo ĵus estis aperiĝinta kaj malgraŭ ĉiuj zorgoj, post du tagoj, sciigis la medicinisto ke baldaŭ mortos Beethoven.

Efektive, li malfortiĝis iom post iom, kaj kiel li stertoris sur la lito, homo aperis estis Hummel, Hummel lia malnova, lia sola amiko. Pri la malsano de Beethoven li estis sciiĝinta kaj zorgojn kaj monon alportis al li, sed ĝi estis tro malfrue; Beethoven jam ne parolis plu, kaj ĉio, kion li povis diri al Hummel estis danka rigardo.

Al li sin klinis Hummel kaj per akustika trumpeto, kiun uzis Beethoven por aŭskulti la vortojn laŭte elparolitajn, li ekkonis al li la doloron kiun li sentis vidante lin en tia sanstato.

Beethoven ŝajnis ekreviviĝi, liaj okuloj brilis kaj li diris : « 'Cu ne estas vere, Hummel, ke mi havis talenton.»

Tiuj paroloj estis la lastaj; liaj okuloj restis senmovaj, malfermiĝis la buŝo kaj la vivo forflugis.

En la tombejon de Dobling'o oni lin enterigis.

Tradukis C. DE REY-PAILHADE.

(Represo malpermesata.)

KATOLIK-ESPERANTISTAJ SOCIETOJ

SOCIETO KATOLIKA INTERNACIA (S. K. I.)

Estas necese, ke la katolikaj Esperantistoj unuiĝu por la propagando, kaj interkomuniku. Sen tio ili restos malfortaj. Ili unuiĝu per S. K. I. La sola kondiĉo de aniĝo estas abono al E. K. La profitoj estas tre multaj; oni povos uzi la adresaron por mil kaŭzoj: korespondado por turistoj, por lernantoj ĉe pastroj aŭ nepastroj, loĝejoj, servistoj, libroj, ĉiuspecaj informoj. Oni povas fariĝi membro sendante vizitkarton kun literoj S. K. I. kaj oni havas rajton sendi tuj kelklinian anonceton por Universala Komunikilo.

14. F-ino M. Barbin, *Le Lion d'Angers* (M.-et-L.), Franc.
15. S-o A. Lefebvre, stenografisto, 23, rue Stephenson, *Paris*.
16. S-o Andreu, *Fourques* (Pyr.-Orient.), Franc.

17. S-o Ludoviko Koller, Wienerstrasse, 38, *Saint-Polten*, Aŭstrio.
18. S-o Christoffel, Pflegehausstrasse, 23, *Braunsweig*, Germanujo.
19. S-o Joseph Pion, 34, rue de la Comédie, *Beaune* (Côte d'Or), Franc.
20. Pastro Jakobo Bianchini, *Fontanafredda de Pordenone*, Ital.
21, S-o Parenty, *Audinghem*, par Marquise (Pas-de-Calais), Franc.
22. S-o A. Rousseau, studento, *Les Moustiers-en-Retz* (Loire-Inf.), Franc.
23. S-o L. Blaas, stud. liter. en *Insbruck*. — Dum la lerneja jaro, en *Feldkrich*, Instituto "Stella Matutina" — Aŭstrio,
24. S-ino William Toner, 32, Jedburg Avenue, *Rutherglen. Glasgow*, Skotlando.
25. S-o J. F. Woods, farmaciisto, *Formby*, apud Liverpool, Anĝl.
26. S-o R. Kmiecik, seminario de *Wlocavek*, Polujo, Rusujo.

PASTRA ESPERANTISTA FRATARO. (P. E. F.)

8. P-o Andreu. *Fourques*, (P. O.) Franc.
9. Kanoniko Van Weddingen, Boulevard des Capucins, *Malines*, Belg.
10. Kanoniko De Broux, rue le Tintoret, *Bruxelles*, N. E. Belg.
11. P-o Honincks, *Laplante* (Namur), Belg.
12. P-o E. Servais, vikario ĉe *Failon*, Belg.
13. P-o Van Oevelen, vikario ĉe *Zoersel* (Oostmal), Belg.
14. P-o Jak. Bianchini, Delegato de E. K. *Fontanafredda de Pordenone* (Udine), Ital.

Notu Bone: Ni pensas, ke neniu pastro, jam [aboninto de E. K. rifuzos esti membro de P. E. F. Tial, ni intencas enskribi en nia proksima N-o la pastrojn, kies nomoj estas en nia abonantaro, *se ili ne skribos al ni por kontraŭdiri.*

LA ABELO ESPERANTISTA.

Konfirmis al ni sian aniĝon :

1. P-o Andreu, el *Fourques* (P.-O.).

2. S-o Malone Bros, 68, 69, 70, Great Strand Street. *Dublin* Irlando.

Ni tre rekomendas tiun Societon al niaj amikoj. Eĉ ne Esperantistaj Komercistoj katolikaj povas enskribiĝi. Ili povos sin surni al la Esperantista Konsulo aŭ Oficejo de sia urbo, por traduko de la korespondado.

PAĜO DE L' DIREKTORO

La Direktoro de E. K. respondos nur al tiuj, kiuj sendos poŝt-karton kun responda flanko, aŭ internacian respondan kuponon.

Pri la Preĝaro. — Ni ricevis jenan leteron :

« Estimata Sinjoro. Mi tre dankas vin por la preĝaro sendita de vi. 'Gi estas bonege verkita, kaj sendube kaŭzos al multaj nekatolikaj kristanoj ekvidi, ke la dogmaro katolika ne estas tiel malsimila al la aliaj dogmaroj, kiel ili opiniis. Almenaŭ ĝi formovos antaŭjuĝojn (kompreneble mi parolas kiel Anglo loĝanta inter protestantoj, kiujn oni instruas de naskiĝo rigardi la katolikan eklezion kiel evitindan), kaj ebligos al la legantoj vidi, ke la katolika eklezio celas la bonon. Eble vi pensos, ke mia rekomendo estas strange enfrazigata. Sed vi estas ĉirkaŭata de Katolikoj bonaj, dum mi loĝas en urbo, kie la plimultò da enloĝantoj malŝatas la eklezion anglikanan, des pli multe la katolikan. Kial ? Ili ne scias ; « niaj prapatroj tion diris al ni », ili diras, kaj sen ekzameno ili akceptas la diron. Tamen, la Lumo venkos, « lumigante al ĉiuj gentoj ». — Via, kun alta estimo, J. E. »

Politiko kaj E. K. — « Tre estimata Kunfrato. En *Espero Katolika* estas dezirinda aparta rubriko : *Rubriko Politika*, donanta la sciigojn pri la plej gravaj aperoj de tutmonda politiko. Se vi trovus iun politikiston, kiu konsentus liveradi tiun kronikon por ĉiu numero de E. K. la legantoj, mi esperas, estus por ĝi al vi tre dankemaj,

mi do persone pli ol aliaj, ĉar mi tiun kronikon tradukinta Litove volonte presadus en mia *Draugija*, kompreneble kun notico, ke tio ĉi estas presita el E. K. Volu pripensi pri tiu ĉi kroniko politika. Via tute, P-o Dombrovski.

Ni deziras koni la opinion de niaj legantoj pri la interesanta propono de P-o Dombrovski. (La Direktoro.)

Internacia responda kupono. — De nun oni povas sendi kuponon por respondo al fremda korespondanto. La lasta poŝta Kongreso, kiu okazis en Romo (1906), decidis la kreon de tia kupono. En Franclando, de la 1-a de oktobro, oni povas aĉeti ilin por o fr. 30.

La kupono estas metata en letero. Tiu, kiu ricevas ĝin, ŝanĝas ĝin en ia poŝt-oficejo de sia lando, kaj ricevas anstataŭe poŝt-markon da o fr. 25.

Certe la Esperantistoj ne forgesos uzi tiun ĉi rimedon, kiam ili deziros respondon de fremda korespondanto.

UNIVERSALA KOMUNIKILO

(Rezervata al la abonantoj de Espero Katolika.)

S-o Marcel Génermont, 11, place de la Gare, Moulins (Alliers), Francl., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn.

S-o Joseph Pion, r. de la Comédie, 34, Beaune (Côte-d'Or), Francl., deziras ricevi el ĉiuj landoj informojn pri la religiaj agoj de ĉiuj homoj : bapto, edziĝo, fianĉiĝo. *La rezultoj de l' enketo estos publigataj en E. K.*

Joseph Pion (adreso supre) sendos 12 diversajn vidaĵojn Esperant. pri Beaune. Prezo afrank.: 1 fr.50 (60 Sd.)

Société commerciale et industrielle Espérantiste de France (Esperantista Societo komerca kaj industria de Francl.). Liveras helpon al ne-Esperantistoj por ĉiuspecaj uzadoj de Esperanto. Por ricevi informojn, sin turni al S-o Lefebvre, sek. de l' societo, 23, r. Stephenson, Paris.

S-o Christoffel, Pflegehausstrasse 23, Brunswig (Germanl.) deziras koni personojn, kiuj interesiĝus pri la

stenografio Gabelsberger » (*natura* metodo, alfarebla kaj alfarita al ĉiuj lingvoj). Li estas aŭtoro de ĵus publikigata *Lernolibro* de tiu stenografio alfarita al Esperanto. (Ni tre rekomendas la Lernolibron.)

S-o Gothardo (Wien) verkis belegan « Patro Nia » por kvar voĉoj, kantita en Cambridge. Aĉetebla ĉe E. K. Vidu prezon sur la kovrilo de la revuo.

PROPAGANDA KRONIKO

Inter la Katolikoj.

Angla. — La semo de nia fervora amiko P-o Richardson estis fruktodona. La grupo de Shanklin (Wight) bone prosperas, sub la prezidanteco de Kapitano F. W. von Herbert.

Irlanda. — P-o Parker (Kilsmyshall), unu el la « Sepo », skribas « 'Ĝis nun, nia afero faris malgrandan kaj malrapidan progreson en tiu ĉi lando. Sed en la estonteco, mi esperas ke multaj Esperantiĝos; kaj fariĝintaj Esperantistoj la Irlandanoj estos tre fervoraj, ĉar ni estas popolo, kiu iras al ekstremaĵoj... ». Ni ne dubas, ke nia amiko sukcesos varbi multajn anojn por niaj diversaj Katolik-Esperantistaj Societoj. Ni scias ankaŭ, ke D-o O' Connor, faros paroladon en Dublin pri Esperanto, kaj kredeble en aliaj urboj. Bonan sukceson !

Franca. — P-o Derroite, vikario ĉe *Saint-Honoré-d'Eylau*, Paris, 108, avenue Victor-Hugo, fondis, la lastan jaron, *Klubon Esperantistan* inter katolikaj junhomoj. Bedaŭrinde, tiun jaron, la junaj lernantoj ne estis tre fervoraj, ĉar ili ne povis *utiligi* Esperanton. Po Derroite ne malkuraĝiĝis. Li kondukis kelkajn junhomojn al Cambridge kaj *L'Étoile*, organo de la Klubo, raportas detale pri la Kongreso. Jen la plano de agado por la nuna jaro

1) Organizi privatajn kunvenojn por interparolado, legado de revuoj, kunlaborado al E. K.;

2) Korespondadi kun fremduloj per ĉiuspecaj interŝanĝoj : poŝtmarkoj, poŝtkartoj, moneroj, kc.

3) Publikigi en *L'Étoile* kurson pri Esperanto, kun speciala vortareto por skribaj kaj parolaj interrilatoj.

P-o Derroit deziras korespondantojn por sia Klubo.

Ni korege aplaŭdas tiun planon kaj deziras plej grandan sukceson al niaj amikoj.

— La fama scienca katolika gazeto *Cosmos*, publikigis longan kaj tre afablan raporton pri la kongreso de Cambridge kun portreto de D-o Zamenhof, fotografaĵojn de kongresanoj, tekston de poŝtkarto, publikigita de l'grupo de Versailles : *la tuta gramatiko de Esperanto sur poŝtkarto*.

Espereble la kleraj abonantoj de tiu fama revuo interesiĝos pri Esperanto kaj lernos ĝin. L' aŭtoro de l' raporto estas S-o Robert Lallié.

Itala. — P-o J. Meazzini, profesoro en la seminario de Arezzo, ĵus publikigis sian longe atenditan vortaron Ital-Esperantan (404 paĝ.), ĉe librejo Hachette. Tia verko estis grande bezonata en Italujo. Niaj amikoj povas de nun pli facile propagandi. Mankas tamen al ili *nacia societo propaganda* kaj Ital-Esperanta gazeto. Certe ili komprenos la necesecon de tiuj propagandiloj.

Holanda. — Nia delegato, S-o van Zwet el Utrecht, skribas : « La Holanda Societo *Estonto estas nia* ekzistas de du jaroj kaj kalkulas nun 160 membrojn. La Societo ne havas organon, sed la grupo de Amsterdam publikigas monate per skribmaŝino malgrandan revuon. S-o Dreves Uiterdijk ĉiam fervore bataladas. »

Nia sindonema delegato estas laboristo, kiu fervore klopodas por disvastigi Etperanton inter la katolikoj. Ni petas niajn Holandajn amikojn, ke ili helpu lin. Ni ne havas ĝis nun pastron Holandan inter niaj abonantoj.

Filipina Esperanta Asocio (Filipinaj Insuloj). — Tiu ĵus fondita asocio volas propagandi en la tuta insulanaro. La Komitato skribas al ni : « Ni proponas, ke vi sendu senpage al ni tridek ekzemplerojn de E. K. monate, dum tri monatoj, kaj ni ilin sendos al sindonemaj Katolikoj, kiuj, ni pensas, povas aboni ĝin. » Bonega kaj imitinda iniciativo! Kompreneble, ni akceptis la proponon. L. Milho.

EN LA MONDO ESPERANTISTA

PROMENADO TRA LA GAZETOJ

Novaj gazetoj. Preskaŭ ĉiumonate naskiĝas kelkaj novaj kunfratoj. Ni ricevis : *Esperanto Bladet* (Helpa Lingvo), oficiala organo de Danlando, kiu publikigas ŝakan rubrikon; *Saksa Esperantisto* (8 paĝ.), kun devizo : « Ni esperu kaj laboru »; *Verda Stelo*, Organo de Centra Meksika Esp. Soc., kiu venas post la mortinta *Lumturo; Filipina Esperantisto*, organo de Filipina Societo, redaktita Angle kaj Esperante; *La Stelo de l'Oriento*, eldonata de la « Esperanto Society of India », en Calcutta; *Laboro*, monata bulteno de « Tutmonda Labora Societo »: *La Esperanta Instruisto*, Angle. kaj Esperante, kiu liveras lecionojn por Anglo j. — Al ĉiuj bonvenon kaj sukceson !

Revenantoj. Reaperis *Idealo*, eldonita en Palermo (Ital.), organo de internacia Societo « La Fasko »; *Amerika Esperantisto*, kiu de longe ne vizitis nin : *Ruslanda Esperantisto* (lasta N-o : Julio).

Internaciaj Gazetoj (Septembro) : *Int. Scienca Revuo* estas pli kaj pli interesa, sub la Direkcio de S-o de Saussure. Ĝi raportas pri la gravega kunveno de Scienceistoj en Cambridge, kaj pri la fondo de « Internacia Scienca Asocio Esperantista ». Oni legas en ĝi la respondon de D-ro Vallienne al D-ro Melin, presita en E. K. Junia. La Redakcio de I. S. R. plipresis noteton jenan « 'Car ni represigis en la Junia kajero de *Scienca Revuo* la respondon de Dro Melin al Dro Vallienne aperintan en *Espero Katolika*, ni publikigas hodiaŭ la de Dro Vallienne kontraŭrespondon, kiu ankaŭ aperis en la Gazeto redaktata de nia amiko samideana pastro Peltier. Tiu ĉi aldonis pri la sama temo kelkajn bonajn respondajn rimarkojn, kiujn bedaŭrinde ni ne povas represigi, ĉar ni ricevis respondojn ankaŭ de aliaj personoj; do ĉar tiu temo cetere ne estas pure scienca, ni devas ĉesigi tiun interesan sed senfinan diskutadon ».

Ni ne havas samajn motivojn por fini la diskutadon, kaj ni estas pretaj enpresi artikolojn pri la « Evolucio de Religia Ideo ».

La Revuo liveras : la plenan tekston de l'Parolado de Dro Zamenhof ĉe la 3-a Kongreso; la rezultaton de ĝia literaturo konkurso.

Tra la Mondo (duobla N-o, aŭg.-sept) daŭrigas publikigon de ĝia rimarkinda Enketo pri edukado en Franc-, Skot-, German-, Japanlando kaj Nov-Zelando ; afable rekomendas la « Hebrea Kalendaro », de P-o Bianchini.

Lingvo Internacia. « La Fosiloj », malnova Franca fabelo, tradukita de S-o Cart, alegerio kontraŭ la reformistoj. Enhavas longan liston de novaj vortoj, elĉerpitaj el « Faraono »; raportas pri la Kongreseto de Blinduloj en Cambridge; citas la *Komentarion* de la Preĝaro kaj la tekston de « Patro Nia » (E. K. Jul.).

Naciaj Gazetoj : *L'Espérantiste*. Fino de l'ĉef-artikolo :

« Cetere estus troigo kredi al la triumfo, kiam ni ankoraŭ ricevis nur komencon de venko. Sendube — kaj tio ĉi estas io granda — ni pli malpli ĉie faris multajn breĉojn en la miljaraj muroj de la rutino kaj de l'skeptikeco, sed la fortikaĵo ne estas kaptita ; ni pensu pri ĝiaj malcedoj. Ni do estu energiaj kaj fervoraj, sed ne malpli *singardaj kaj lertaj en la taktiko*, ĉar la fervoro kaj la konfido ne sufiĉas por ni. Ili eĉ povus malutili al ni, se ili trompus nin pri niaj fortoj kaj tiuj de l'malamikoj aŭ eĉ de l'konkurantoj. » — L. de Beaufront.

Belga Sonorilo daŭrigas la rimarkindan studon pri la Lingvo Internacia. En N-o de novembro 3-a oni legas, okaze de la kunveno de la Delegacia Komitato

« Tiuj, kiuj deziras la venkon por la grava ideo de la internacia helpanta lingvo, ne devas restadi sur la limigita horizonto de Esperanto, tiel agrabla kaj interesa, kiel ĝi estas.

Ili devas scii tion, kio estas aliaj solvoj de la problemo, ekzemple Idiom Neutral, Mundolingo, Universal, Latino sine flexione, Novilatin, kc., kc.

La komitato elektita de la Delegacio laboras nun kaj sen-

halte por ekzameni tiujn solvojn de la grava problemo.

Nu, ni jam ekvidigis tion, Esperanto estas je la unua vico, sed kun proponoj de « tutperfektigo » dank' al la eksperimentoj faritaj precipe dum la dek ĵus pasintaj jaroj.

La Esperantaj principoj regas la definitivan elekton, al kiu sin direktas la komitato de la Delegacio ; tiu komitato aplikadas logike kaj plivastigas tiujn principojn ; ĝi flanke forigas iajn trofruajn kreojn de vortaroj pri Esperanto, kiuj minacis la internacian lingvon kaj internigus ĝin en la marĉo enhavanta la fantaziaĵojn kaj absurdaĵojn de l' naturaj uzado kaj evolucio ; per forigo de la supersignitaj literoj, per la nevarieeo de l' adjetivo, per la laŭvola uzo de l' akuzativo, per severa aplikado de la reguloj pri devenigado, fine per alpreno de kelkaj novaj internaciaj afiksoj, la Delegacio povos prezenti al la mondo helpantan lingvon, varbontan ne sole la Esperantistojn, sed la partianojn de Neutral, de Novilatin, de Latino sine flexione, kc., kc. (Mozano.)

La Suno Hispana raportas pri la Kongreso kaj liveras la tutan paroladon de Dro Zamenhof, ankaŭ detala raporto en *Svisa Espero*, en *Esperantisten*, en *The American Esperanto Journal*. Nia kunfrato *Antaŭen Esperantistoj* komencis ĝian 5-an jaron, de julio. Plej sinceraj gratuloj ! En *Japana Esperantisto* legiĝas : Historio de la Japana Esper. Soc., kaj interparolado por lernantoj, kun Japana teksto.

Brazila Revuo Esperantista enhavas bonegan kronikon pri Sud-Ameriko. La *Verda Stelo* liveras ĝian programon kaj informojn pri la Meksikana Societo. *Afrika Esperantisto* anoncas tre bonan staton de nia afero en Alĝerio. *Esperanto-Ĵurnalo* (12-an de sept.) : Kongresaj impresoj, de H. Hodler. Tute leginda.

La nombro de niaj gazetoj ĉiam pligrandiĝas. Tio estas signo de prospero. Baldaŭ, espereble, ni atingos la centon ! Ni bezonas, antaŭ ĉio, propagandajn organojn en ĉiu nacio, kune kun nacia Esperantista societo.

Prof. E. Lime.

LA TRIA KONGRESO

Pri la laboroj de la Kongreso mem la Gazetoj liveris nur mamulton da informoj. Ĝenerale oni ne multe laboras dum kongresoj ! Dro Zamenhof deklaris, en sia parolado : « Ĉu ni kunvenas por paroli pri Esperantaj lingvaj demandoj ? Ne ! tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la Kongreso, sed eksklusive al la Lingva Komitato... Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en Esperanta parolado ? Por tio sola ni ne bezonas veturi al Kongreso... Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon ? Jes, certe ! Sed... ni faras manifestacion kaj propagandon por la Esperantismo ne pro ia utilo, sed pro tiu gravega signifo, kiun Esperantismo havas por la tuta komaro... »

Post tia deklaracio, ŝajnas malfacile prepari tagordon de laboro.

Dum la 1-a Agada kunsido, oni legis : Raporton de la Organizo Komitato, Raporton de la Centra Oficejo, Raporton pri la progresoj de Esperanto per la Ruĝa Kruco.

Dum ceteraj kunvenoj ĝeneralaj, oni diskutis pri la loko de la 4-a Kongreso kaj pri dato de Festo Esperantista. S-o Boirac, Prezidanto de la L. K., legis Raporton pri la laboroj de la dirita komitato. La L.K. ne akceptis la konkludojn de raporto de S. Moch pri la verbaj formoj : mi amatas, sinonimo de « mi estas amata ». Oni elektis komision por interrilati kun la « Delegacio por alpreno de helpanta internacia lingvo ». Estas elektitaj S-oj de Beaufront, Christaller, Jamin kaj Rhodes.

— La specialistaj kunvenoj faris tre ŝatindan laboradon. Kunvenis Marista Ligo, Internacia Muziksocieto, Brita grupo medicina, Tutmonda labora Societo, Katolikaj Esperantistoj, Ŝakludistoj, Pacifistoj, Kontrau-alkoholistoj, Kristanaj Klopodantoj, Blinduloj, Liberpensuloj, Anoj de Esperantistujo, Framasonoj, Tutmonda Societo de Komercaj informoj.

Plie de tiuj kongresetoj, okazis interesega Kunveno pri la traduko de Biblio, sub la Prezido de Po Rust. Celo : 1)

sciiĝi pri la penadoj jam faritaj; 2) konsideri kiel plej bone akiri veran internacian tradukon; 3) studi la rimedojn por eldoni tian tradukon. La diskuto estis tre interesa. Oni nomis komitaton, la « Trio por la Biblio » : P-oj Rust, Schneeberger kaj Peltier.

Bedaŭrinde P-o Peltier ne povis akcepti la proponon al li faritan, ĉar laŭ la leĝoj de l'katolika Eklezio, la teksto de la Sankta Skribo ne devas esti eldonita sen notoj por klarigi la malfacilajn signifojn laŭ la instruo de la Sanktaj Patroj kaj de la Tradicio katolika. Tio, eble, ne povus esti akceptata de ali-religianoj.

S-o Evstifeieff, ĉiam preta por helpi noblan entreprenon, proponis preni sur sin la publikigon de speciala revuo, por realigi la proponojn de la kunveno.

— Flanke de la katolikaj Diservoj, okazis tre gravaj kaj sukcesplenaj Diservoj protestantaj unu ĉe « St-Mary's » preĝejo, kie la diservo estis tute en Esperanto, kun bela prediko de P-o Rust (P-o Rust tradukis la Anglan Diservon kun aprobo de la protestanta episkopo de Ely): Alia Diservo ĉe la Kongregacia Kapelo, kie predikis P-o Selbie, « kvinsemajna Esperantisto ».

Ni ne reparolos tie ĉi pri la katolikaj Diservoj, ĉar ni detale raportis pri ili en E. K. oktobra. (Oni povas ricevi plenan raporton pri la « Katolikaj kunvenoj dum la 3-a Kongreso », sendante o fr. 25).

Konkludo La 3-a Kongreso estis grandega sukceso ĉu ni devas proklami ke Esperanto *nun* venkis plene kaj ne devas plu timi kontraŭulojn ?

Gravega demando, kiun ni ne kuraĝas solvi !... Estu ni singardemaj kaj modestaj. Ni rigardu al la estinto; al la instruanta historio de Volapuck En 1888, la Volapuck kalkulis (1) 283 societoj aŭ kluboj, ĉirkaŭ 1 milionon da adeptoj. La nombro de la verkoj estis 316, (inter kiuj 182 en la sola jaro 1888). La 3-a Kongreso okazis en Paris (1889).

---

1. « Extrait de l'Histoire de la Langue Universelle », de Leau et Couturat, p. 27-28.

Sed tiam komencis la ruiniĝo. Ekzistis partio de reformistoj, kiuj konsentis por igi la lingvon pli simpla, pli praktika. P-o Schleyer ne volis akcepti la reformojn. Tio naskis konflikton inter la « majstro » de l'Volapuck kaj la *Akademio*, Nova Akademio elaboris *Idiom Neutral* kaj tiu ĉi « ido » mortigis la patrinon.

Ni estu singardemaj kaj modestaj ! Ni atentu la lecionojn de Historio.

Prof. E. Lime.

BIBLIOGRAFIA KRONIKO

Hachette kaj K-o. — *La Faraono*, de B. Prus, el Pola lingvo tradukis Dro Kazimierz Bein (Kabe). 2 vol. de 220 kaj 230 paĝ. Oni ne povas tro admiri la nelaceblan laboremon de Dro Bein. Tiu nova traduko estas vera ĉefverko, pro la klareco de l'stilo, pro la granda intereso de la libro mem. E. K. jam parolis pri B. Prus, unu el la ĉefoj de Pola literaturo. — Rimarketoj pri la *lingvo* de Dro Bein : uzo de adjektivoj devenantaj de propraj nomoj kaj skribitaj sen ĉefa litero kaj sen ia klarigo pri la signifo; uzo de « fiero » (fiereco), « feliĉo » (feliĉeco); uzo de novaj radikoj *avangardaj* linioj (vol. 1 p. 11), ricevi *avancon* (p. 46); la *seno* de Abraham (p. 62), pli bone estus *sino* ; *oponi* (p. 66), bonega necesa vorto; *martiri*, kun la senco de *martirizi*, kc. Ŝatinda penado por pliriĉigi la lingvon.

Aliaj libroj *Tutmonda jarlibro Esperantista*, 1907. Ĝi estas verkita laŭ metodo nova; liveras *nur* la nomojn de tiuj, kiuj enskribigis sin. Tre saĝa ! Rimarketo : oni devus presi, supre de la paĝoj, la enhavon de la paĝo, almenaŭ la *nacion* pri kiu oni parolas sur la paĝo, ĉar estas tre longe serĉadi adreson en la Jarlibro, tia kia ĝi estas. — *La Virineto de la Maro*, de Andersen, traduk. Dro Zamenhof, ilustrita (42 paĝ.) *La Rompantoj* (kvin monologoj), de F. Puĵula-Valjes; ilustrita (34 p.) — *Angla lingvo sen profesoro* de Tristan Bernard. Unuakta Komedio, trad. G. Moch. (44 p.). — *Imenlago*. de Theodor

Storm, trad. A. Bader (97 p.). — *Kastelo de Prelongo*, romano originale verkita de Dro Vallienne (515 p.). Ni reparolos pri tiu grava verko, kiu ne estas konsilinda al gejunuloj. — *La Nevo kiel Onklo*, de Schiller, trad. Ch. Steward (53 p.). — *Fundamento de Esperanto*, eldono *Greka*, trad. Konst. Kuluri. — Sama verko, eldono *Itala*, trad. Rosa Junck. — *Konkordanco de Ekzercaro*, ellaboris A. Wackrill (95 p.).

Librejo de Esperanto (15, r. Montmartre, Paris). *Esperanto Manuel*, de G. Chavet et G. Warnier. Dua eldono revizita k. korektita. Tre rekomendinda, Prezo 1 fr. — *Pri la elparolado de Esperanto*, de G. Moch (72 p.), 1 fr. Respondo al la broŝuro de Ĉefeĉ : Tre klera studo. — *Solo de Fluto*, de P. Bilhaud, trad. F. Doré (11 p.) : 60 centim. — *Kial ili estas famaj???* de G. Feydeau, trad. F. Doré : 50 centim.

Presa Esperantista Societo. — *Naŭlingva Etimologia Leksikono* de Esperanto, de Louis Bastien. Utilega por lingvistoj; liveras por ĉiu radiko la vortojn naciajn, kiuj estas pli malpli similaj, en lingvoj Latina, Franca, Itala, Hispana, Portugala, Germana, Angla, Rusa. Prezo : 3 fr., 1 Sm. 20. — *Rakontoj al mia belulino*, 134 p. Belega libro, interesega, leginda.

Moller k. Borel (Berlin). — *Taschenworterbuch Deutch Esperanto und Esperanto-Deutsch*, de Dro Zamenhof, 137 p. Prezo 1 m.; 50 Sd. — *Esperanta Germana Frazlibro de la ĉiutaga vivo*, prilaboris Borel. 58 p. Prezo 0 m. 50; 25 Sd.

— *Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri?* Respondo al Prof. Diels, de Louis Couturat, 27 p. Prezo 0 m. 20; 10 Sd. Bonega argumentado; tre leginda.

Les Nouvelles Langues Internationales. (La Novaj Lingvoj Internaciaj), de S-oj Leau k. Couturat. Tiu volumo (120 p.) estas sekvo de l' verko *Histoire de la langue universelle*, de l'samaj aŭtoroj. En ĝi estas analizo dediversaj projektoj publikigataj post la apero de l'citita verko. kaj de projektoj malnovaj, ne ankoraŭ konitaj de l'autoro.

La plej interesaj estas: Resumata Historio de *Esperanto*, kun la plano de reformoj proponita de D-o Zamenhof (1894) *Idiom Neutral* (1902); *Universal* aŭ *Panroman* (H. Molenaar, 1903); *Latino sine flexione* (Peano, 1903); *Novilatin* (E Beerman, 1907).

Tiu libro estas necesa por tiuj kiuj volas sekvi la evolucion de l' ideo pri internacia lingvo. kaj por tiuj, kiuj volos *kompreni* la baldaŭan decidon de la *Delegacio por alpreno de helpanta lingvo internacia*.—Aĉetebla nur ĉe S-o Couturat, 7, rue Pierre Nicole, Paris, 5. Prezo: 2fr.50 (1 Sm.).

Grupo de Brunswigo. (Germanl.) *Lernolibro de la Natura Stenografio Gabelsberger,* alfarita al Esperanto de G. Christoffel.— 50 p. (Prezo 1 M. 50; 2 fr.; 75 Sd.). Nia amiko, S-o Christoffel, liveras al ni tre valoran verkon ĉar ekzistas alfaroj de sistemo Gabelsberger por multaj lingvoj, kaj ankaŭ *Internacia Stenografa Asocio Gabelsberger,* kies centro estas la « Reĝa Saksa Stenografa Oficejo » en *Dresdeno*, la urbo de nia 4-a Kongreso. La Stenografistoj devas serioze atenti tiun libron. La sistemo estas tute rekomendinda pro logikeco kaj simpleco. Oni memoru, ke Stenografio estas uzebla ne nur por stenografi paroladojn, sed por persona laboro, por korespondado rapida. La Redakcio kaj Administracio de E. K. tre volonte akceptus respondi al leteroj en Stenogafio Gabelsberger, se estis sufiĉe multaj Esperantistoj konantaj la sistemon. Tio ŝparus multe da tempo! Ni proponas; se ni ricevas 100 respondoj, ni lernos tuj la stenografion Gabelsberger.

Was ist Esperanto, broŝuro en germana lingvo, ilustrita per portretoj de famaj Esperantistoj. Sama eldonejo.

Centra Oficejo (r. de Clichy, 51, Paris. — *Esperantista Societaro*, tria eldono, korektita ĝis la 30-a de junio 1907 (1 fr 50; 60 Sd.) 140 paĝ. — La *Esp. Centra Oficejo* daŭrigas la publikigon de sia utilega *Dokumentaro*. La Esperantistoj certe tre ŝatos la novan volumon, ĉar ĝi liveras plej akuratajn kaj dezirindajn informojn pri la

diversaj societoj, gazetoj, grupoj, kc. — *Morala Edukado de la Popola Infano* (gardejoj, someraj kolonioj). Parolado de S-ino de Ménil ĉe la Tria Kongreso (France kaj Esperante). 23 p. en granda formato. 1 fr. (40 Sd.); ilustrita per tre belaj vidaĵoj. Ni tre rekomendas tiun libron por la propagando inter la virinoj kaj inter tiuj, kiuj interesiĝas pri la morala edukado de l' popolo. — *Le Congrès Espérantiste de Genève* (Esper. Kongreso de Genevo), de E. Boirac, ekstrakto el *Revue Pédagogique*. 14 p. (40 centim., 16 Sd.). Liveras bonegajn argumentojn **Hans Th. Hoffmann**, Esperanta Eldonejo, Berlin, W.35. — *Esperantista Kantaro* (kolekto unua), esperantigita de L. E. Meier el München, 80 p. (Prezo 1 fr. 25; 50 Sd.). Kolekto de Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj. Tiuj kantoj estas kanteblaj laŭ la originalaj melodioj populare konataj. — Ni esprimas la deziron, ke oni publikigu la ariojn, ĉar alie la libro estus vendebla nur en Germanujo. « La kanto liberigas la animon de malĝojaj pensoj ! » — *Die Weltsprachen-Bewegung von der Forum sachverstaendiger Kritik* (La movado de tutmondaj lingvoj antaŭ la forumo de kompetenta kritiko), von Dr W. Borgius, 28 paĝ. La *Reĝa Saksa Societo de l' Sciencoj* komisiis en printempo ĉi-tiujara du el siaj membroj, nome la profesoron de la indogermana lingvoscienco, Karl Brugmann, kaj la profesoron de la Slavaj lingvoj, Aŭgust Leskien, ambaŭ ĉe la Universitato en Leipzig, por esplori la movadon rilatantan la enkondukon de tutmonda lingvo. Tiu ĉi esploro estas publikigita kiel broŝuro sub titolo « *Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen* (Pri la kritiko de la artefaritaj lingvoj tutmondaj), aperinta en la eldonejo Karl J. Trübner en Strassburg. Kontraŭ tiu kvazaŭ oficiala publikigaĵo de du kompetentuloj la anaro de la artefarita lingvo Esperanto devas energie protesti. Tiun ĉi taskon plenumos la supre citita studaĵo. Espereble tiu ĉi bonega kaj science energia broŝuro, kiu estos bonega batalilo en la manoj de niaj Germanaj Etperantistoj, por longe malebligos pseŭdo-kritikojn similajn al tiuj de

Brugmann kaj Leskien. 'Ciu, kiu interesiĝas pri la movado de tutmonda lingvo kaj deziras havi senpartian priĵuĝon pri tio, devas legi la bonegan broŝuron de D-o W. Borgius !

Internacia Propagandejo Esperantista (Merton Abbey, London, S. W.). *Chave do Esperanto* (Brazilujo) kaj *Esperanto Kulcs* (Hungaru o); novaj ŝlosiloj de S-o 'Cefeĉ. Ni memorigas, ke ĉiuj eldonaĵoj de S-o 'Cefeĉ estas nun aĉeteblaj ĉe *Internacia Propagandejo.*

Diversaj. — *Un Recteur de l'Université de Berlin et l'Esperanto* (Rektoro de l' Berlina Universitato kaj Esperanto), de S-o C. Thiaucourt, prof. ĉe la Univ., Nancy, 14 p. in-8; Paris, Hachette. Tre klera refuto de Prof. Diels. Afable citas la Papan Benon al E. K. por montri, ke Esperanto ne estas la « lingvo de la framasonoj ». — *Du mirindaĵoj* (eldono de *Chemin de fer de l'Ouest*). Gvidlibro ilustrita, France kaj Esperante, al *Mont St-Michel* (Monto S. Mikaelo), unu el la « sep mirindaĵoj » de Okcidento. S-o Elie Galard, nia amiko, Prezidanto de l' Grup o Esper. de Angers, faris la tradukon Esperantan de tiu gvidlibro. Oni ne povis imagi pli bonan propagandilon. Enhavas multajn anoncojn pri Esperantaj gazetoj aŭ aferoj, inter aliaj, anonco por E. K. Koregan dankon. Prezo de l' broŝuro o fr. 75 (3o Sd.). — *La departemento Ain (Francl.)*, estas simila gvidlibro ilustrita, eldonita de « Publika Esperanto-Oficejo de Bourg, kun la helpo de la « Iniciata Sindikato de Ain ». Verkita nur en Esperanto. Prezo 10 centim.; (6 Sd.) Franca eldono sola : 25 centim.; (10 Sd.). Venu la tempo, kiam ni havos gvidlibrojn por ĉiuj landoj, en Esperanto !

Morituri vos salutant, Armena rakonto de V. Papazjan tradukis Georgo Davidov. Broŝureto el la *Esperanta Universala Biblioteko*, publikigita de S-o A. Marich, Budapesto-IX, Ulloi ut, 59. Tiu libreto komencas la « Armenan Serion », rakontas la mondfaman buĉadon, kiu okazis en Armenio. Tre leginda. Prezo : 3o hel. (12 Sd.).

Prof. E. Lime.

'SAKOJ

(Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2. Aŭtrujo.)

Problemo XVI-a
(originala)

Komponis Jan Wierzbicki, Lwow

Nigro : 7 pecoj.



Blanko : 6 pecoj.

Blanko komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

Solvo de Problemo XVI-a
de A. Novejarque

BLANKO	NIGRO
1. R — 4T	R — 4D
2. R — 4C	R — 3D
3. R — 4K (m).	

'Guste solvis : W. W. Padfield, Ipswich. A.C. Wright Guadalajara (Mexico).

Pri la ŝakproblemo

Solvu nun, leganto, la sekvantan belegan duiraĵon de Pastro Jespersen : BR a8, BD a1, BT-oj C3, C 8, BC e7, BK-oj b7, d8, BS-oj b3, f2, f6, g3. NR e5, NT h5, NC h8, NK g6, NS f7, c7, d7. Ensorĉas vin la antaŭiro, post kiu B. sian reĝon metas en danĝeron. Mortigo sekvanta post terura defendo per la N K faros impreson de admiro kaj vi komprenos, kio estas la *ideo* de la problemo.

Por tuta atingo de tiu ĉi impreso oni devas ekkoni *enhavon* de la problemo, pripensante ĉiujn defendojn de N.

Ekzemple en la sekvanta duiraĵo de Loyd : BR h7, BD g2, BT f6, BC-oj d7, h1, BK-oj e7, f5, BS f7. NR f4, N T-oj a4, a5, N C-oj b7, h6, N S-oj e3, g6, h4, ne sufiĉos eltrovi uuuan solvan iron kaj ekvidi *ĉefan minacon* per la BD. Oni devas pripensi ĉiujn defendojn de N. kontraŭ tiu ĉi minaco kaj oni vidos, ke preskaŭ post ĉia grava defendo sekvos alia mortigo. Tio ĉi estas *variantoj* de la problemo. Tiu ĉi duiraĵo enhavas sep variantojn, kiuj faras agrablan impreson, kiel a *ĉefa ludo*.

Noto.— Por klarigo de la ciferoj kaj literoj, kiuj montras la lokon de la pecoj, vidu la figurajon de Problemo XV-a en E. K. oktobra (p. 30).

El la 'Sakmondo.

Esperanto Bladet, organo de la Dana Esperantista Societo (54 B, Osterbrogade, Kopenhago), komencas en ĝia oktobra kajero ŝakrubrikon, sub la redakcio de S-o Andr. Nissen, partoprenanto en nia Koresponda 'Sakturniro. Unua artikolo alportas belan originalan kvarirajon de la fruktodona komponisto P-o Jespersen en Svendbergo kaj ludnoton de la interesa konsiliĝ-ludo ludita en Kopenhago.

Ni deziras bonan sukceson al la nova kolego !

Ludo XVI-a

Reĝallogajo rifuzita

Ludita en lasta Karlobada majstraturniro

XI rondiro 3 sept. 1907

Blanko :	Nigro :
Marshall	Kohn
1. S — 4R	S — 4R
2. S — 4KR	K — 4K
3. Ĉ — 3KR	S — 3D
4. S × S	S × S
5. S — 3KD	K — 5ĈR
6. D — 4T (ŝ)	K — 2D
7. D — 2K	C — 3KD
8. S — 4ĈD	K — 3D
9. K — 4K	Ĉ — 3KR
10. Reĝsaltas.	Reĝsaltas.
11. S — 3D	S — 4ĈD
12. K — 3Ĉ	S — 4TD
13. S × S	Ĉ × S
14. K — 5Ĉ	Ĉ × K
15. D × Ĉ	T — 1ĈD. La N. staras nun senhelpe kontraŭ antaŭiro de la B. Soldatoj.
16. S — 4D	K — 2R
17. Ĉ × S	S — 5Ĉ
18. Ĉ — 2K	K — 4Ĉ
19. T — 2K	S × S
20. D × S	Ĉ × S
21. Ĉ × Ĉ	K × K
22. Ĉ × S ! Tiu ĉi surpriza oferajo malsukcesigas malesperan defendan planon de N.	
	22. T × C
23. T × T	R × T
24. C × K (ŝ)	R — 3K
25. S — 4TR	S — 3TR
26. D — 3KR (ŝ) kaj gajnas.	

Erareto. — *En la Problemo XV-a, en loko h3, anstataŭ Bl. Damo devas esti Bl. Reĝo. Oni facile povis diveni la erareton.*

Le Directeur-Gérant, Em. PELTIER.

Presejo de *Espero Katolika*, Sainte-Radegonde (I.-et-L.), Franck

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro : Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 *bis*, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono, 23 fr. (En Francl. 20 fr.). 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'ACTION FRANCISCAINE (*Franciskana Agado*). — Monata organo de Franciskanaj Asocioj. Bonega Franca revuo 32-paĝa. Pritraktas socialajn demandojn. — Abono jara 7 fr. (6 fr. en Francl.). Admistr. 117, Bd Raspail, Paris. - 6e.

LES LANGUES VIVANTES (La *Vivaj Lingvoj*), Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca kaj **Esperanta**. Ilustrita Revuo duonmonata. — Eldonita de la firmo Bloud, 4, rue Madame, Paris.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Ekster Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D-o ZAMENHOF.—'Ce Hachette kaj Ko, Paris. — Jare, Francujo Fr. 6 ; ceteraj landoj Fr. 7 fr.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto. Literatura aldono, 16 paĝoj. Jara abono : 7 fr. 50 (3 sm.). Administracio Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, monata organo de la *Societo por la Paco*. — Abono, 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-o Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

TRA LA MONDO, tutmonda multilustrita revuo esperanta, — Nuntempaĵoj ; artoj, literaturo, scienco ; komerco ; industrio ; militistaro, maristaro ; teatro, sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj ; konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr.; kvaronjare 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoficejoj.

KOLEKTISTOJ : S-o VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas kaj interŝanĝas uzitajn poŝtm.

KOMERCAJ VOJAĜISTOJ ATENTU ! — Vojaĝisto estas dezirata en Francl. por preslaboroj kaj libroj Esper. Nenia speciala instruado necesa. — Skribu al la Direktoro de E. K.

KATALOGO DE ESPERO KATOLIKA

Katolika Preĝaro, 1-a volumo, 180 p., kun *Imprimatur* de M-ro Renou, Ĉefepiskopo de Tours . . 2 fr. 50
Kato kun botoj, luksa eldono, 6 ilustraĵoj. 0 fr. 50
Cindrulino, el sama kolekto. 6 ilustr. 0 fr. 50
La du verkoj kune mendataj . . . 0 fr. 75
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la 2-a Kongreso de Esperanto en 'Genevo (1906). Plena raporto kun la prediko de P-o Em. Peltier . . . . . 0 fr. 15
Hebrea Kalendaro, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini (Italo), kun *Imprimatur* de M-o Renou, 'Ĉefepiskopo de Tours . . . . 0 fr. 20
Patro Nia, ĥoro por soprano, aldo, tenoro kaj baso, dediĉita al la *Tria Kongreso* kaj kantita dum la meso por Katolikoj en Cambridge. Teksto kaj kompono de Johano Gorhardo (154-a verko); 6 paĝoj da muziko. Aĉetebla pogrande *nur* ĉe *Espero Katolika*. Prezo : 60 Sd., 1 M. 25. 1 fr. 50
Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro Dombrovski (2-a eldono). . . . . 0 fr. 65
Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. Dombrovski . . . . . 1 fr. 80
Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe *E. K.*

KATOLIKAJ KUNVENOJ DUM LA TRIA KONGRESO en Cambridge (1907) 0 fr. 25

PER TELEFONO, sceneto de Jacques Freneuze; kun permeso de l' aŭtoro tradukis Josée Guivy. 0 fr. 15

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

1-a SERIO : 1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro). 'Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.). Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr. — (La *kolekto ĝis marto 1906 : 5 fr. afrankite*).

2-a SERIO : Duono de la 3-a jaro (de marto 1906 ĝis oktobro 1906) — 4-a jaro (de oktobro 1906 ĝis oktobro 1907) : 7 fr. 50 (En Francl. 6 fr.)

KATOLIKA PREĜARO

EN KIU TROVIĜAS 'ĈIUJ DIMANĈAJ DISERVOJ

KAJ

LA PLIMULTO DE LA FESTOJ DE L' JARO

Latine kaj Esperante

Aprobita de Lia Alta Moŝto M-o RENOU

'Ĉefepiskopo de Tours (France)

1-a volumo. — Prezo 2 fr. 50 (1 Sm.)

Presita per literoj signitaj el la firmo ALLAINGUILLAUME & Cie, fandistoj
21, rue Montparnasse, Paris